

La Normanoj (2)

Pri la normanaj konkeroj de suda Italio kaj Sicilio mi donas nur kelkajn bazajn informojn ĉerpitajn el la germanlingva Vikipedio:

La normana konkero de suda Italio okazis en la 11-a jarcento dum pluraj jardekoj. Komence – ĉirkaŭ 1017 – normanaj dungosoldatoj servis tie al diversaj lombardaj kaj bizancaj regantoj. Iom post iom la normanoj komencis akiri siajn proprajn terposedaĵojn kaj establi praformojn de malgrandaj ŝtatoj. Tiuj kunfandiĝis, kio post kelka tempo igis la normanojn fakte sendependa forto en la regiono. Iliaj vastaj konkeroj inkluzivis Sicilion, la tutan sudon de la itala duoninsulo (escepte de Benevento, kiun ili nur mallonge okupis dufoje) kaj Malton.

Kio estis la “Normana Reĝlando” (menciita pasintan semajnon)? Temas pri la komenco de la Reĝlando Sicilio. Vidu:

Ekde 1061 normanaj militistoj konkeris la insulon Sicilio, kiu estis regita de la “saracenoj” [islamaj araboj] ekde 827. La konkeranto Roĝero la 1-a fariĝis grafo de Sicilio kaj Kalabrio [regiono en suda Italio]. Lia filo Roĝero la 2-a heredis la Duklandon Apulio. En 1131 la regionoj regataj de la normana dinastio fariĝis la Reĝlando de Sicilio. Per pliaj konkeroj Roĝero la 2-a povis etendi sian regadon sur la tutan sudan Italion ĝis la Papaj ŝtatoj.

En 1194 la tiama normana Regno de Sicilio estis heredita de Henriko la 6-a de la dinastio Hohenstaufen, kiu estis edziĝinta en 1186 kun Konstancino de Sicilio, filino de Roĝero la 2-a de Sicilio kaj onklino kaj heredantino de la lasta normana reĝo Vilhelmo la 2-a.

Mi diris „komenco de la Reĝlando Sicilio”, ĉar tiu regno – sub diversaj dinastioj – fakte ekzistis ĝis 1861.

En la artikolo pri Amalfi mi diris, ke en tiu urbeto troviĝas katedralo konstruita laŭ normana-araba stilo. Kio estas tiu stilo? La itallingva Vikipedio uzas nur la terminon “normana-araba arkitekturo”, tamen en aliaj versioj oni uzas por tiu arkitekturo – aŭ stilo, arto, kulturo – la adjektivojn “normana-araba-bizanca”. Ekzemple en la germanlingva Vikipedio legeblas:

Oni nomas “normana-araba-bizanca” la arton de la miksitaj kristana-islama kulturo kiu estas tipa por Sicilio. Ĝi aperis post la normana konkero de Palermo inter 1060 kaj 1088 kaj estis anstataŭigita en la 13-a jarcento per la arto normana-Hohenstaufen. Ĝi estas ankaŭ konata kiel normana-sicilia aŭ sicilia romanika stilo, sed estas rimarkebla ankaŭ en kontinenta Sud-Italio [ekzemple en Amalfi].

Tiu sintezo okazis pro tio, ke la normanoj ne koloniigis Sicilion, sed formis nur la superan tavolon. La enloĝanta popolo, do ankaŭ metiistoj kaj artistoj kiuj faris la normanajn konstruaĵojn estis ankoraŭ miksaĵo de la grek-bizanca loĝantaro kaj de la islamaj araboj, kiuj konkeris kaj ekloĝis la insulon en la 9-a jarcento. Ankaŭ ĉe la kortego okazis dum kelka tempo simbiozo; la normanaj reĝoj ĉirkaŭis sin de grekaj kaj arabaj konsilistoj, havis orientan haremon, elektis registarajn sloganojn el Korano kaj gravurigis islamajn honorajn nomojn sur siajn monerojn.

La arkitektura stilo de tiu epoko en Sicilio kaj apudaj partoj de kontinenta Italio diferencas de la tiutempa romanika stilo de la cetero de Italio kaj de la latina Eŭropo pro tio, ke okcidentaj, islamaj kaj bizancaj influoj kunfandiĝas en harmonian unuecon. Ĉar la normana Reĝo Roĝero la 2-a – kiel "defendanto de Kristanismo" [...] – daŭre celis gajni la favoron de la Eklezio kaj

aparte de la Papo per belaj konstruaĵoj, la plej tipaj reprezentantoj de tiu arkitektura stilo estas ĉefe preĝejoj.

Pro tio ekzistas ankoraŭ pluraj ne tre grandaj preĝejoj, sed ankaŭ kelkaj grandaj. La plej antikva inter tiuj estas la katedralo de Salerno (kies konstruado komenciĝis en 1080) [Salerno situas 25 km for de Amalfi], kaj la plej bela verŝajne estas la katedralo de Monreale, proksime al Palermo, la plej granda urbo de Sicilio. En 2015 UNESKO deklaris la araban-norman parton de Palermo kune kun la katedralo de Monreale kaj tiu de Cefalú (80 kilometrojn for de Palermo) Monda Kulturheredaĵo.